

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



60a jaro n° 4

julio - aŭgusto 1968

septembro - oktobro

novembro - decembro




# Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice  
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81  
Maertens Grégoire  
Poupeye Charles

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :  
Dr. Pol Denoël Durwael Ivo Iserentant Roger

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO & PREZIDANTEJO  
Debruyngaen 44, Wilrijk Tel. (03) 27425

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO  
Kempeneers Paul Sielens Henri

GENERALA PREZIDANTO  
Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ  
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk  
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

UNUA VICPREZIDANTO  
Roose Fernand

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

GENERALA SEKRETARIO  
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO  
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis  
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO  
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTINO Terryn Juliette, Raapstraat 72 Gent - Tel. (09)255381

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2  
P.K. 9051 25

## Ni mobilizu

## niajn fortojn

La laboro por la Internacia Lingvo estas nek simpla nek facila. Ĝi postulas de ĉiuj - tute egale en kia formo aŭ en kiu medio ili aktivas - libervoian disponigon de tempo kaj energio. La personoj en gvidaj pozicioj havas aldonajn devojn, kiuj, interalie, ofte necesigas pliajn temporabajn oferojn de intelektaj kaj fizikaj fortoj por specialaj studoj, analizoj de situacioj, planado, organizado kaj realigo de agadoj en lokaj, landaj aŭ mondaj kadroj. De la karaktero de ilia laboro grandparte dependas ne nur la atingoj aŭ malsukcesoj, sed ankaŭ la pozitiva, indifereanta aŭ negativa imago pri Esperanto en la publika opinio".

Tiujn vortojn eldiris, dum la Inaŭguro de la 53a U.K. en Madrid, la Prezidanto de U.E.A. Prof. D-ro I. Lapenna, kiun la ĉeestantoj escepte forte kaj longe aplaudis.

Post vigla diskuto de tiu parolado, la Komitatoj de U.E.A. decidis ne nur unuanime, ĝin aprobi, sed ankaŭ rekomendi la fundan studon kaj aplikon de ĝiaj rekomendoj al la naciaj instancoj, kiujn ili reprezentas, kaj ankaŭ al la lokaj instancoj, kiuj konsistigas la naciajn societojn.

Por tiuj niaj legantoj, kiuj neniam multe pripensis la kunmeton de nia movado aŭ por la novvarbitoj, kiuj ĝin eble ne konas, ni rediru ke la lokaj grupoj kuniĝas en la naciaj federacioj aŭ ligoj, kiuj siavice kunligiĝas en la Universala Esperanto-Asocio.

Tio signifas do ke, -kiam iu eldiras plendon pri io nefarita aŭ malbone/farita, -li ne rajtas diri "Belga Federacio ne faris aŭ malbone faris: aŭ U.E.A. ion ne faris aŭ malbone faris... Li prefere diru kaj certe pensu: NI (do: MI) ne faris, malbone faris.

Efektive, en la tuta Esperanto-movado, ĉiu simpla membro de grupo rajtas, dum la ĉiusemajna kunsido, diri sian opinion pri io aŭ proponi ion... certe, se li povas aldoni la rimedojn por efektiviĝi la proponon... se li do diras per kiuj financaj rimedoj afero estas efektivegebla... kaj se li deklaras sin preta mem efektiviĝi ĝin, ĉu sola, ĉu en kunlabro kun amikoj, kiuj antaŭanancis sian pretecon helpi.

Regule, -plurfoje en la jaro, -la grupaj delegitoj ĉe B.E.F. same havas la okazon priparoligi proponojn faritajn en la grupoj.

Same la Komitatoj de U.E.A., - kaj ĉiu lando havas sian aŭ siajn reprezentantojn en la Komitato, - rajtas, daŭre dum la tuta jaro, informi la estraron de U.E.A. pri ĉiuj proponoj faritaj, kie ajn en la mondo, kaj kies realigo povas okazi nur sur internacia skalo.

Ĉiu forstreku do el sia vortaro: "La Grupo, Federacio, U.E.A. nenion faras" aŭ "ne faris tion aŭ tion ĉi"... Ĉiu pensu, kiel supre dirite, ke "la laboro por la Internacia Lingvo estas nek simpla, nek facila" kaj ke "ĝi postulas libervolan disponigon de TEMPO kaj ENERGIO"... kaj



Karaj legantoj,

Okaze de la nova jaro, la redakcio de SONORILO deziras al vi plej feliĉan kaj sukcesan jaron 1969.

Ni pardonpetas pro la prokrasto rilate la aperon de nia revuo: ni povas antaŭmeti diversajn kialojn sed vi certe legis jam pri la decido ke nur aperus kvar numerojn en 1968. Ĉar jam tri numeroj aperis, ni devis atendi por eldoni la kvaran ĝis la fino de la jaro.

Sed vi ja scias ke je iu momento ni devis ŝanĝi niajn planojn rilate la Straatburgan kongreson, kaj ni decidis kunlabori al markola kongreso en Bruĝo. La unua artikolo nur pritraktis la eblecon de tiu kongreso, post interkonsento kun Sro Doyelle; sed kiam tiu teksto estis preta, ni ricevis la konsenton de la Nordfrancoj, ŝanĝis la tekston, kaj ricevis la interkonsenton de la Britoj. Ni denove ŝanĝis la tekston, pro la fakto ke ni opiniis ke ni devis tuj komuniki tiun certecon; intertempe la presejo estis en la finjara periodo kaj devis dum dekkvar tagoj rezigni al poresperanta laboro.

Pro la multaj tekstoj, komunikajoj kaj raportoj ni publikigos la sekvon de la artikolo "Esperanto kiel lingvo por diplomatoj" en la unua numero de 1969.

Tiu numero, la vintra, aperos en februaro.

La redakcio



mi aldonas... de MONO... ĉar, kiel diras la francoj: "l'argent est la nerf de la guerre"... Ĉiu milito, eĉ la plej paca, bezonas monon.

Tro da proponoj ja envenas ĉe la lokaj, landaj kaj mondaj estraroj, kiuj postulas multe da mono... pli da mono ol tiuj instancoj ofte posedas.

Estas pro tio ke, antaŭ kelkaj jaroj, estis starigita en nia lando, la "Fondajo M. Jaumotte-Loquet", pri kiu ofte membroj, ne nur novaj, sed eĉ veteranoj petas: "Kion oni "faras" per tiu mono", kunigita per grava, komenca donaco al kiu intertempe aldoniĝis pluraj donacoj, tiel ke nun la Fondajo altiĝas ĝis 124.741 Fr.

Por tiuj, kiuj ne scias, -kaj certe por tiuj, kiuj jam faris individuajn donacojn, mi volas ripeti, ke la kapitalo estas kaj restas netuŝebla, en tiu senco ke estas la rentumsumoj, kaj nur la rentumsumoj, kiuj povas esti elpagitaj por difinitaj propagandaj celoj.

Ekzemple, mi diru ke PLENA RENTUMO DE DU JAROJ estas ĵus nun metita je dispono de nia "Belga Lerneja Komisiono" okaze de grava klopodo de niaj valonaj amikoj, por enkonduki Esperanton en la lernejoj... kaj ke la estraro de la "Fondajo" nun jam pretas fari la saman geston, kiam sama klopodo okazos por la flandraj instruistoj.

Same en U.E.A. : ĵus estas starigita speciala institucio "Fondajo Hodler 1968", kies kapitalo neniam povos esti foruzita, sed kies rentumo estos metita je dispono de U.E.A. por efektivo de specialaj, propagandaj planoj... Tie la sumo, kiun oni deziras atingi, altiĝas je N.Fl. 500.000 aŭ Fr. 7.000.000.

Post unu alvokcirkulero, jam pli ol UNU MILIONO kaj DUONO belgaj francoj estas kunigita de kelkaj, fakte ne multaj homoj, kiuj komprenis ke nia movado antaŭeniros nur la tagon, kiam la diversaj instancoj, sed precipe la naciaj kaj internaciaj, disponos ja pri la necesaj rimedoj por efektiviĝi, ni diru, la duonon de la belegaj ideoj, kiuj elspruĉas el la cerbo de niaj fidelaj, sed ofte ne ĉiam realecaj amikoj!

Supre de tiu ĉi artikolo estas alvoko al Mobilizo... kio supozigas la neceson de enmeto aŭ "enĵeto" de ĉiuj homaj fortoj kaj de ĉiuj eblaj monaj rimedoj.

Ĉiu do pretigu sin al plia nova laboro... Kaj tiuj, kiuj vere plenaryte povas diri "Mi ne havas tempon" pensu pri tiu dua ebleco : la monhelpe.

Se ili ne povas helpi la "Fondajon Hodler 1968" per iom grava mondonaco aŭ per subskribo de repagebla obligacio... ili pensu pri la belga "Fondajo", kiu akceptas eĉ la plej etan donacon... Ili pensu pri la ĉiutage "bonago" de la skoltoj... Ili ĉiutage flankenmetu, laŭ siaj eblecoj, unu, du aŭ tri francojn... Kaj ĉiumonate transdonu aŭ ĝiru la kunigitan sumeton al la fondaja ĝirkonto !

Tiel ĈIUJ niaj "mobilizeblaj" membroj, t.e. ĉiuj niaj membroj kaj legantoj iel helpos al la atingo de nia fina celo, nia venko, la oficiala kaj plena akcepto de nia lingvo.

Maurice JAUMOTTE

## 7-a markola kongreso

## 51-a kongreso de B.E.F.

BRUĜO 3 4.5.1969

### ADRESO POR KORESPONDADO

G. MAERTENS Prins Leopoldstraat 51 Sint-Kruis

### Nia Kongreso en 1969

La Belga Esperanto-Federacio ricevis oficialan sciigon de la U.F.E. (Franca Unio de Esperantistoj) ke la organizantoj de la Franc-Germana kongreso, kiu okazos en Strasburgo kaj kun kiu B.E.F. intencis kunkongresi, ne povos akcepti nin kiel kongreson "pro lokaj cirkonstancoj". Ĝi ja pretas akcepti la belgojn individue. Pliaj klarigoj ne estis aldonitaj.

Vendredon la unuan de novembro, okaze de la festo de la junulara grupo de Bruĝo, la sinjoroj Jaumotte, Roose, Poupeye kaj Maertens, en la hejmo de tiu lasta, havis kunvenon kun sinjoro Doyelle el Bourbourg (Norda Francujo) por preparoli la eblecon de markola kongreso. Ni proponis kiel lokon Bruĝo; kiel daton 3a kaj 4a de majo. La motivo de tiu lasta propono estas ke lundon la 5an de majo okazos matene la fama procesio de la Sankta Sango. Do, tiuj kiuj ŝatos, povos resti tiun matenon kaj vidi tiun procesion. Ni proponis ankaŭ ke S-ro Doyelle estu la kongresa prezidanto kaj la du lokaj prezidantoj (S-ro Poupeye de la Bruĝa Grupa Esperantista kaj S-ro Roose de "Paco kaj Justeco") estu la vicprezidantoj de la kongreso. S-ro Maertens estu la sekretario. La kongreskotizo restos fiksita je 100 belgaj francoj. La Bruĝaj esperantistoj, speciale la junuloj faros la laboron, i.a. la festaranĝojn. S-ro Doyelle akceptis ĉion. Li promesis tuj kontakti la Francajn kaj Britajn gesperantistojn por demandi ilian konsenton kaj eventualajn rimarkojn kaj sugestojn. Laŭ letero de la 13.11.1968. S-ro Odent, Prezidanto de la Nordfranco Esperanto-Federacio jam akceptis la proponon.

Lastmomente ni ekseiis ke la britoj ankaŭ konsentis.



Ensendojn por la  
januaro - februaro -  
marto numero ni petas  
antaŭ la 15.1.1969



## VASTA KLOPODO DE LA "BELGA LERNEJA KOMISIONO"

Kiu ajn estos la rezulto de escepte grava klopodo de la "Belga Lerneja Komisiono", valoras kaj necesas ke ni substreku, jam nun, la eblajn gravajn sekvojn, kiujn ĝi povos havi sur nia tuta movado en la estonto.

Dank'al al sukceso, kiun akiris nia Prezidanto D-ro Pol Denoël apud ne-esperantistaj pedagogiaj instancoj kaj personoj en Lieĝo kaj nome ĉe la "Ecole Supérieure de Pédagogie de Liège" estas iniciatita kurso, nomita por "Professeurs d'Espéranto" kaj kiun rajtas ĉeesti ĉiuj, ankaŭ ne-esperantistaj instruistoj kaj homoj, kiuj iel rilatas al la edukado.

Ĝi konsistas el kvar lecionaroj (entute 90 horoj), kiujn ni ĉi sube citas kun la nomo de la profesoro kaj la nombro de horoj:

1. Précision et perfectionnement des notions linguistiques en Esperanto (D-ro P. Denoël : 24 horoj).

2. Historique de l'Espéranto et Littérature espérantiste" (S-ro G. Van Breuse ; 24 heures).

3. Principes psycho-pédagogiques de l'enseignement de l'Espéranto (S-ro F. Falatre : 8 heures).

4. Séminaire de pratique de l'Espéranto et de son enseignement (D-ro P. Denoël kaj aliaj specialistoj : 34 horoj).

La celo de tiu ĉi kurso estas la akiro de "certificat d'aptitude de l'enseignement de l'Espéranto dans les écoles et à l'occasion des activités post-scolaires". Temas do pri vera "Profesora Kapableco", kiu akiras sian veran valoron nur okaze de estonta enkonduko de Esperanto en la lernejojn, eĉ se temas nur pri nedeviga instruado en la kadro de post-lernejaj aktivecoj.

La diplomo estas akirebla de instruistoj el ĉiuj partoj de la lando; sed ĉar la kurso estas organizata en Lieĝo kaj okazos en la franca lingvo, povos esti ke ĝia leĝa valoro por flandraj esperantistoj ne estu tuja kaj aŭtomata. Sed ĉiuj klopodoj estos farataj por ke la teksto de la diplomo estu kiel eble plej ĝenerala.

Por atingi kaj konviki la instruistojn de nia lando, D-ro Denoël kunmetis traŭtan broŝuron, akireblan je la eta prezo de Fr. 15... Estas por ties eldono sub aŭspicioj de la "Fondajo M. Jaumotte-Loquet", ke iom grava sumo estis rezervita de la estraro de tiu Fondajo al tiu ĉi klopodo de D-ro Denoël kaj de kelkaj liaj amikoj, kiuj ricevu, jam nun, niajn plej sincerajn gratulojn.

La inaŭgura leciono de tiu ĉi kurso, kiu okazos ĉiunmerkrede de la 14a ĝis la 17a horo en salono de la "Ecole Supérieure": 52, rue du Lavue, Lieĝo, okazis mekredon la 16an de oktobro kaj D-ro Denoël parolis pri "Interlinguistique et Structuralisme".

Tiun paroladon ĉeestis lernantoj kaj ankaŭ aliaj interesitoj, inter kiuj pluraj esprimis, post la inaŭgura parolado, sian intencon enskribiĝi.

Estis S-ro Marcel Collinet, prezidanto de la direkto de la "Supera Pedagogia Lernejo", kiu prezentis la oratoron, dum, - je la fino, - nia Ĝenerala Prezidanto, kiu ĉeestis kun S-ino Jaumotte kaj kelkaj antverpenaj samideanoj kaj pluraj gvidantoj kaj membroj de la lieĝa verviersa Grupoj, gratulis kaj dankis ne nur la iniciatinton D-ron Denoël sed ankaŭ tre varme S-ron Collinet, kiu per sia komprenemo, multe helpis al efektiveco de nia iniciato.

Al ĉiuj ĉeestintoj estis donacita la bele presita kaj riĉenhava broŝuro supre citita: "L'Espéranto dans l'Enseignement", kiun nepre devos ekhavigi al si ĉiu Esperantisto, kiu iel interesiĝas pri la propagando por nia lingvo. Ĉiu trovos en ĝi multajn detalojn, ignoratajn aŭ forgesitajn.

## RAPORTOJ

### PRI

### KONGRESOJ



#### 1) La kongreso de UEA en Madrid de 3 ĝis 10 aŭg. '68

Tiu kongreso ne apartenas al la serio de la plej multnombre ĉeestitaj. Nur ĉirkaŭ 1750 partoprenintoj. Relative malmulte. Komparu kun tiuj de Sofio kaj de Budapeŝto. Ili spegulas eble la popularecon de Esperanto en la okcidento kaj en la oriento?

Tamen ankaŭ pri tiu-ĉi ni povas diri ke ĝi estis sukceso. Espereble ni de nun povos diri la saman pri ĉiuj venontaj kongresoj. Tiun sukceson kaŭzis ĝiaj seriozeco kaj alta kultura nivelo 1) flanke de la multaj fakaj kunvenoj.

Oni devas esti blinda aŭ fanatika por ne admiri unue la fakon ke ĉiuj nacioj tie, senpere intertraktas per unu lingvo; kaj due ke tiom da homaj okupiĝoj - juro, religioj, sociaj movadoj k.a. - estas prilaborataj en same tiom da kongresoj dum tiu ĝenerala, universala kongreso. Preter aliaj faktoj, jam tiuj-ĉi montras ke Esperanto estas kulturfaktoro de plej granda graveco. Sed ne estas ĉio.

Jam depost pluraj jaroj la teatraj prezentadoj donas brilon al tiuj kongresoj. Mi ne volas paroli pri la literatura kaj oratora konkursoj; mi ne ĉeestis, kaj mi prefere ne juĝas. Ankaŭ depost jaroj la somera universitato aldonas sciencecan flankon al niaj universalaj kongresoj.

Fine; la kongreso frontas la aktualajn problemojn kiuj rilatas al nia strebado. Tiun-ĉi fojon ĝi volis malfermi la okulojn de la gesamideanoj (kiuj siavice malfermu la okulojn de siaj gekonatoj en siaj medioj) je unu speco de diskriminacio (tiu de ĉiuj gentoj laŭvoĉe kondamnita diskriminacio) malofte rekonata sed ne malpli reala: la lingva diskriminacio. La ĉarto pri Homaj Rajtoj de UNO proklamita en 1948, tekste emfazas la plenan egalrajtecon de ĉiuj popoloj grandaj kaj malgrandaj sen konsidero pri koloro kaj opinioj, kaj la lingvan egalecon. Sed la fakto ke la lingvoj estas dividitaj en kategoriojn de "oficialaj" kaj "laboraj" dum ke la aliaj ne estas allasitaj, kontraŭstaras tiun principon. Tio estas klara. Nur nesciantoj kaj tiuj kiuj ne volas scii, argumentos ke ne estas eble alie agi sur tereno de la lingvo. La vero estas ke ili ne volas rekoni esperanton.

1) Ke en tiu kultura agado oni faras mispaŝon estas neeviteble kaj do pardonende. Ekzemplo. Ekde 1958 la Dana eldonejo Koko donas la arĝentan spronon al la "aŭtoro de la jaro". Tiamaniere estis honorigitaj jam M. Boulton, J. Sed ke ĝi en Madrid aljuĝis la premion al V. Sadler pro la poemaro? "Memkritiko" estas provoko al la kulturo.



Estas feliĉo ke la lingvaj malfacilaĵoj kreskas terurige, kaj malhelpas multe glatan internacian funkciadon. Ĉar pro tio pli kaj pli da gvidantoj turnos sin al la nura solvo. Aparte ni menciuj la tre gradajn necesajn kostojn de tiu sensenca lingva situacio (cirkonstanco malinda je la universalema homaro). Kaj tio en momento ke UNO kaj konsorcioj estas en ŝuldoj kaj ke necesas tiom da mono por helpi la ne evoluintajn popolojn. UEA jam liveris kaj plu liveros ciferojn edifajn.

En la malfermo de la kongreso Prof. Lapenna antaŭmetis kelkajn fundamentajn tezojn rilate la lingvon, la organizadon de la movado, kaj la eblecojn aŭ ŝancojn de Esperanto. Unu de la tezoj estis: konservi la lingvan unuecon. Legante tion, mi demandas al mi mem ĉu alia tezo ne devas esti: konservi la lingvan facilecon. La unua ŝajnas al mi ne esti en danĝero; la dua jes. Ni ne forgesu ke ni estas ankoraŭ en la periodo ke ni devas varbi bonvolemajn personojn el la popolamasoj; ne ankoraŭ en la periodo ke Esperanto estas oficiala fako en la lernejoj kie profesoroj povas laŭplaĉe ĝoji pro lingvaj malfacilaĵoj kiujn ili solaj konas, kaj per kiuj ili povas ankaŭ laŭplaĉe amarigi la vivon de la gelernantoj. Estas vere ke ĉiuj lingvoj plimalfaciliĝas. La multaj novaj teknikoj kaj sciencoj (kaj artoj) ampleksigas la vortarojn kaj estigas ankaŭ apartan frazeologion. De tiu ĝenerala evoluo Esperanto ne kapablas kaj ne povas fortiri sin. Do, por klareco kaj ĝusteco ankaŭ Esperanto bezonas novajn vortojn. Tamen ne povus esti ke aŭtoroj senbride - oni emas diri kaprice - enkondukas neologismojn. Je ĉi tiu aŭ alia maniero la Akademio devos interveni kaj pravigi tiujn - kaj forjeti la aliajn neologismojn.

Per la aliaj tezoj prof. Lapenna pruvis-se tio estis ankoraŭ necesa - ke li estas ne nur granda organizanto kaj iniciatanto, sed ankaŭ unu de niaj ideologoj. Ni speciale atentigas pri lia konvinko de la estonta venko de Esperanto, konvinko bazita ne je sentimentaleco aŭ deziroj, sed je la observado de la evoluo de la nacioj kaj de ilia perlingva intertraktado.

Detalojn pri la kongreso rilate al la sciencaj prelegoj, al la teatraĵoj kaj al la kunvenoj k.a. oni povas trovi en "Esperanto" (Sept. '68) kaj en "Heroldo". Nur unu lastan ĝojigan konstaton mi volas citi. Oni bezonis grandan komercan monsumon por la eldono de la nova scienca revuo "La Monda Lingvo - Problemo... La mondo estas. Oni bezonas grandan nombron da certaj antaŭmendoj por ke la "Plena Ilustrita Vortaro" povu aperi. Nu, la nombro estos certe atingita. UEA fondis "Kapitalo Hodler" por disponi pri laborkapitalo de 500.000 Guld.2) Kvinono estas jam enspezita. Ĉio tio montras la grandan helpemon de la esperantistoj kaj la fidon kiun ili havas en siaj gvidantoj.

## 2) Tria Seminario por Gvidantoj kaj NEJOJ,

organizita de la NEJO-Komisiono de TEJO; dum aŭgusto '68 en Bruselo.

### SUKCESO MALGRAU...

Malgraŭ la malgranda interesiĝo de junaj esperantistoj, la Tria Semi-

2) Pri tiu "kapitalo Hodler" vidu aliloke en tiu-ĉi numero.

nario por gvidantoj de TEJO kaj NEJOJ plene sukcesis. El 15 partoprenantoj (pasintjare 8) nur du reprezentis Esperanto-organizaĵojn, nome BEJA-n kaj TEJO-n.

La 13 aliaj venis el katolikaj junularmovadoj (agrikultura, KLJ, mezklasa KJM, porknabina "CHIRO"), el ĝeneral-protestanta (Z.J.W.), Humanista (H.J.B.), studenta (UFSIA) kaj Eŭropmovada (BVSE). Wouter Pilger kaj Hans Bakker, nome de la NEJO-komisiono, gvidis la seminarion, kaj foje diverslandaj esperantistoj vizitis.

Ok docentoj, ĉiuj spertuloj pri sia temo, pritraktis Kongresorganizaĵon, Redaktadon kaj eldonadon de revuoj. Financojn, Subvenciojn, Administradon, Gvidadon de diskutoj, La mondon de la internaciaj organizaĵoj, kaj Publikajn rilatojn. La administra departemento de la Brusela Kreditbanko demonstraciis sian maŝinaron, kaj krome unu posttagmezo konsumiĝis per t.n. Estrarludo (Management Game), speciale verkita por la kurso.

La vesperoj kaj la noktoj estis "liberaj", post la plenprogramaj tagoj.

Tio multe kontribuis al neformala interŝanĝado de personaj spertoj, esprimo plej vastsence komprenenda... Krom ĉi tiu aspekto, ankaŭ la aliaj celoj de la kurso efektive estas atingitaj:

- ekligo de bonaj kontaktoj kun NEJOj;
- sentruda demonstracio ke Esperanto estas praktika kaj plenvolara interkomprenilo;
- altigo de la prestiĝo de TEJO;
- financa profito por la NEJO-komisiono;
- edukado de propraj homoj per vere altkvalitaj kursoj.

Rilate tiun lastan punkton, la rezulto povus esti multe pli granda, se pli da junaj esperantistoj komprenus ke moderna junularmovado ne povas funkcii nur per amatora bonvolo, sed postulas kompetentajn gvidantojn. Rimarkinda sperto nia estas, ke ĝuste dinamikaj kaj fortaj organizaĵoj montris interesiĝon pri la seminario, kaj ĝenerale malfortaj, postrestantaj grupoj apatie reagis.

Ĝuste ili, tamen, bezonas tiajn kursojn. Partopreno povus vekti kaj stimuli ilin. Gustumo povus kaŭzi plian apetiton, kaj tiumaniere la koncerno unuiĝo havus eblecon "tiri sin je la propraj haroj el la marĉo".

Raporto pri la aranĝo verŝajne aperos baldaŭ en la nederlanda lingvo, je prezo de 1,50 gld. Pro tio, ke ne alvenis antaŭmendoj de esperantistoj, eldono en Esperanto ne estas antaŭvidata nunmomente. Nur se ankoraŭ alvenos sufiĉaj antaŭmendoj (ĉ. 100 ekz.), traduko aperos.

## 3) IKUE/KELI-Kongreso.

La Unua Komuna Kongreso de IKUE/KELI, okazinta de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 1968 en Limburg/Lahn, Germanujo, estis plena sukceso kaj donis esperigajn rezultojn. Preskaŭ 200 el la 218 aliĝintoj el 18 landoj, inter ili ankaŭ orientaj, ĉeestis ĉi tiun historian kongreson, kies frukto ne nur estas pli intima estonta kunlaboro inter la protestantaj kaj katolikaj esperantistoj, do KELI kaj IKUE, sed ankaŭ la forigo de multaj personaj antaŭjuĝoj. Per multaj prelegoj kaj diskutadoj pri eĉ tiel tiklaj problemoj kiel ekz. la Reformacio mem, la kongresanoj fervore agadis por pli bona kompreno inter la konfesioj. Ne mirige, ke ĉe la



fino multaj demandis, kial oni tiel longe atendis aranĝi komunan kongreson, kaj ĉiuj pledis daŭrigi ĉi tiun ĵus komencitan kongres-serion.

Estis ĉefe labor-kongreso, sed kompreneble oni ankaŭ multe preĝis; ekz. okazis tri komunaj diservoj. La programo krome enhavis - por la unua fojo dum E-kongreso - publikan koncerton en la katedralo de Limburg kun diversaj kantoj en Esperanto kaj la KANTATA ESPERANTO MESO de la juna jugoslava komponisto Janko Jezovšek. Folkloran vesperon aranĝis la kongresanoj mem. Duontagaj kaj tuttaga ekskursoj kompletigis la programon.

La kongreso starigis "ekumenan komitaton", kiu zorgos por la plua vivado de la donitaj impulsoj kaj kontaktos ekumenajn instancojn ekster la E-movado. Krome oni starigis laborgrupon por la paco, kiu kontaktos ankaŭ MEM.

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Niaj legantoj bonvolu relegi la parton de la ĉefartikolo, kiu temas pri nia "Fondaĵo M. Jaumotte-Loquet" kaj pri la "Fondaĵo Hodler 1968".

Ĉiu plene konvinkigu ke la sola ebleco de sukcesigo de novaj klopodoj kuŝas en financa forteco de niaj organizaĵoj... kaj konkludu.

Ni diru ke ĈIUJ donacoj, eĉ la plej etaj, estas akceptitaj kaj estos menciataj, kun indiko de nomo aŭ de nuraj inicialoj, en nia Revuo.

Transpreno	123.141 F
Fino Begodt, Merelbeke	100 F
Bruselo grupo, okaze de la kongreso	1.000 F
Ges. Mathieu - Plumhans	72 F
	<hr/>
	124.313 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

La Fondaĵo ĵus elspezis 18.000 F por la eldono de la broŝuro :

L'ESPERANTO dans l'enseignement, de Dro Pol Denoël.

Tiu broŝuro pritraktas i.a. :

Pourquoi l'ESPERANTO à l'école ?

Fondements de la valeur pédagogique et éducative de l'ESPERANTO.

L'Enseignement de l'ESPERANTO dans différents pays

Etat de la question dans divers pays.

Avantages pour l'étude de langue maternelle.

Avantages pour l'étude des langues étrangères.


Avantages pour l'étude des langues étrangères.

Correspondance et échanges interscolaires.

Avantages pour l'étude d'autres branches ktp.

La ekstera aspekto kaj la enhavo respegulas seriozecon eble tro malofta ĉe similaj eldonoj. Varme rekomendita al ĉiuj legantoj de Sonorilo (15 F, ĉe Dro Denoël, rue Victor Raskin 20 Liège).

## KARAVANE FLUGU AL HELSINKI



En 1969 okazos, sub aŭspicio de la nederlanda landa asocio L.E.E.N. aviadila karavano al la 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko, kiun organizas F-ino M.H. Vermaas en Rotterdam.

Vojaĝo :

La veturo Amsterdam-Helsinko-Amsterdam okazos per aviadilo de la kutimaj linioj, kun daŭros nur kelkajn horojn, do oni alvenos freŝa kaj ripozinta. Oni foriros en la malfrua postagmezo, kio signifas ke tiu, kiuj loĝas malproksime de Amsterdam ne bezonos tranokti en tiu urbo la antaŭan nokton.

Forveturo :

Oni forveturos merkredon la 23-an de julio 1969 (la Kongreso okazos de 26.7 ĝis 2.8.1969). Oni alvenos en la vespero de tiu tago. Dum la morgaŭa tago oni havos tempon trankvile orientiĝi en la kongresurbo. La Kongresejo ekfunkcios jam vendredon matene.

Restado :

De 23.7 ĝis 2.8 oni loĝos en tre bona hotelo (kat II), sur la tereno mem de la Kongresejo. Otaniemio, en dulitaj ĉambroj kun banĉambro (duŝo kaj necesejo). Post la Kongreso :

Post 2.8 ĉiu estos libera partopreni postkongresan aranĝon aŭ alimaniere ĝui plian restadon en Finnlando.

Reveturo :

Principe, reveturo de la tuta grupo samtempe ne estas nepre kondiĉo. Tial, lige kun postkongresaj aranĝoj, provizore estas fiksitaj tri datoj por la reveturo : 9.8, 13.8 kaj 16.8. Oni povas esprime sian deziron en la aliĝilo.

Aliĝilo :

Specialan aliĝilon por la karavano oni bonvulo peti de F-ino Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R Rotterdam 2.

Prezo :

La prezo de la karavanvojaĝo, inkluzive de :

flugveturo Amsterdam-Helsinko-Amsterdam ;

10-taga loĝado en hotelo kun banĉambro, apud la Kongresejo ;

servmono en la hotelo ;

aŭtobusaj transportoj inter hotelo kaj flughaveno ;

flughavenaj impostoj ;

asekuro je flugrisko ĝis 100.000.- gld. : 9200 Fr. (665 gld.).

Unupersonaj ĉambroj :

Tiu, kiu nepre deziras unupersonan ĉambron, devas pagi plusan sumon de entute 1180 Fr. (85 gld.).

Mangoj :

En Finnlando loĝado en hotelo ne inkluzivas la matenmanĝon. Sed en Otaniemio troviĝas memserva restoracio kie matenmanĝo kostas 3,50 fmk., dum la prezoj de aliaj mangoj varias de 3 ĝis 7 fmk.

La finna marko :

Oni povas kalkuli, ke la kurzo de la finna marko estas proks. 12 F.

Pago vojaĝsumo :

Sendante plenigitan aliĝilon por la karavano, oni bonvulo samtempe ĝirpigi la komencon sumon de 100.- gld. ĉ 1400 bfr. La ceteran sumon oni povas pagi poste, sed ĉiukaze antaŭ la 15-a de majo 1969. Poŝtĉekkonto : 333790 de F-ino M. H. Vermaas.

Fine, ni povas certigi, ke la karavano ĉiukaze efektiviĝos. Oni ne riskas sperti seniluziigon pro nuligo, ĉar eĉ kun malmultaj partoprenantoj ĝi realiĝos sen ŝanĝo en la prezo. Cetere, estas jam nun tiom da interesitoj, ke ne estas dubo pri kontentiga nombro.



# Esperantista

La Bruĝa junulara grupo ekzistas kvin jarojn.



Sur la unua vico ni rimarkas de maldekstre, dekstren :

S-roj Dirk Iserentant, G. Maertens (malantaŭe de li : S-ro J. Couwenberg) F-ino R. Roose, S-ro Debrouwere, S-ro F. Roose (sur liaj ŝultroj du sinjorinaj kapoj : S-inoj Roose kaj Poupeye). La urbestro, S-ro Jaumotte (inter ambaŭ S-ro Doyelle, Prezidanto de la markola kongreso) Tamsin Johan (malantaŭe de li S-roj Poupeye kaj Demeulenaere) S-ro P. Blondelle kaj F-ino Roose ML (inter ambaŭ S-ro D. Maertens) Plej dekstren staras S-ino Debrouwere. Maldekstre ni vidas ankoraŭ la delegitojn, ne ankoraŭ menciitaj, de la junulargrupo : W. Lauwers, Piet Blondelle, J. Maertens kaj (malantaŭe de Randi Roose) Hilda Lauwers kaj Paul Marechal. La aliaj personoj estas la skabenoj.

Tiu vigla grupo ĝuas jam ian konatecon en la lando ĉar ĝi partoprenis diversajn aranĝojn kaj kongresojn : Oostende, Charleroi, la junulara festo en Verviers. Nun ni festis ĝian unuan jubileon. Jaudon la 31 an de oktobro estis balo en la tre (tro ?) granda festosalono de Schuttershof. Kvankam multaj kartoj estis venditaj, la partopreno povis esti pli ampleksa. Aliflanke estis preskaŭ ĉiuj gejnuloj ( $\pm 130$ ) kaj la atmosfero estis tre gaja. Antaŭ la komenco de la balo estis malfermo de ekspozicio en la halo, tiel ke ĉiuj enirintoj devis preterpasi ĝin. S-ro Iserentant, la direktoro de la vendinstituto "Sonorilo" aranĝis ĝin. Parte la materialo estis de la "Verda Stelo" de Antverpeno, kiun ni kore dankas pro tiu helpo.

# Junularo

Vendredon la unuan de novembro estis la oficiala akcepto en la urbdomo de Sint-Kruis. Ni estis agrable surprizitaj ne nur pro la ĉeesto de multaj skabenoj sed ankaŭ de la urbestro mem. Unue S-ro urbestro diris sian estimon pro la aktiveco de tiu juna grupo, honorigis ĝin kaj bonvenigis ĉiujn invititojn. Poste S-ro Jaumotte, kiel prezidanto de B.E.F. parolis kaj, kiel ĉiam, li tre trafe faris tion. La laŭcirkonstanca parolado estis la tasko de S-ro Roose. Li metis la gravan problemon de la universala lingvo en la kadro de la multaj gravaj, urĝaj kaj komplikaĵaj problemoj kiuj nuntempe frontas la homaron ; kaj li akcentis la rolon de la junularo en tiu evento. Poste ĉiuj trinkis la honorvinon. Laste, Paul Blondelle, prezidanto de tiu juna grupo, dankis kaj donacis al la urbestro lernolibron de Esperanto kaj belan eldonon : "El la Japana Literaturo". Tiu libro havos lokon en la urba biblioteko, espereble kun ankoraŭ multaj aliaj esperantaj eldonoj.

Poste ĉiuj ĉeestantoj subskribis en la ora libro la bele desegnitajn paĝojn, dediĉita al tiu akcepto.

La junulara grupo havis belan memorindan feston.



P. Blondelle

subskribas

la oran

libron

Angulo de

la ekspozicio

(paneloj de

la Verda Stelo

- Antverpeno)





## "FONDAJO HODLER 1968"

Kiel dirite en la ĉefartikolo, ĵus estis starigita en Rotterdam la institucio "Fondajo Hodler 1968", kies celo estas kunigi gravan kapitalon, kies rentumo, - kaj nur la rentumo, - povos esti uzita por specialaj propagandaj celoj de la Universala Esperanto-Asocio.

La oficialaj kaj laŭleĝaj starigantoj de la Fondajo estas tri estraranoj de U.E.A.: nia ĝenerala Prezidanto S-ro Maurice Jaumotte, kaj du nederlandaj estraranoj: S-roj E.L.M. Wensing kaj E.J. Woessink.

Administrato de la Fondajon, la eks-direktorino kaj honora membrino de U.E.A.: F-ino Marianna Vermaas.

La Fondajo akceptas ĉiujn donacojn kaj ankaŭ pruntojn per subskribo de obligacioj (repagoblaĵoj) de N.Fl. 1.000. La estraro tamen rajtas antaŭvidi pruntojn per subskribo de malpli ol N.Fl. 1.000.

La pruntoj povas esti faritaj senrentumaj kaj kontraŭ kompenso de 2 %-a rentumo.

La institucio klopodos kolekti kapitalon de minimume N. Fl. 500.000 t.e. SEP MILIONOJ da FRANKOJ. Unu kvarono de tiu sumo estas jam akirita.

Ĉiuj-ni serioze pripensu, ĉu ni ne povas iel helpi al la atingo de tiu minimuma kapitalo, kiu devas ebligi vere seriozan laboron.

La stariga kunsido de la fondintoj okazis, en Eindhoven, sabato, la 12an de oktobro 1968 kaj la unua estraro estas kunmetita jene:

Prezidanto: la vicprezidanto de UEA: S-ro E.L.M. Wensing; sekretario kaj samtempe vicprezidanto: nia ĝenerala Prezidanto S-ro Maurice Jaumotte, estrarano pri Turismo de UEA, kaj kasisto: S-ro E.J. Woessink, estrarano pri financoj de UEA.

## NIA REVUO

La administrantaro de B.E.F. longe diskutis, dum speciala kunsido en Bruselo, le eldonon de nia Revuo dum la proksima jaro 1969.

Ĝi alvenis al la konkludo ke la aper-programo kaj la enhavo de la revuo devas esti nepre reviziita.

Pri la eldona ritmo, ni diru ke aperos, dum 1969, KVAR ampleksaj kaj en Esperanto redaktitaj numeroj, laŭ la nuna modelo, sed kun artikoloj, kiuj pli regule sekvos la evoluon de nia movado, ne nur en propra lando sed ankaŭ en la eksterlando.

Krom tiuj kvar numeroj en nia lingvo, kaj, - por ke ili povu esti uzataj propagandcele, - estos eldonitaj apartaj, malpli ampleksaj numeroj en nacia lingvo, kiuj enhavos artikolojn, interesajn por ĉiuj, sed kiuj estos tamen direktitaj en la propagandcela direkto, tiel ke ili povos interesi ankaŭ la ne-esperantistan publikon.

Tiuj numeroj estos presataj en pli granda kvanto tiel ke la Grupoj povos ricevi pli grandan kvanton de tiuj numeroj...

Ni ja nepre devas, eliri nian ŝelon kaj "ataki" pli vastan publikon!



## KRONIKO

### Esperanto penetras en la skolta mondo.

Dum la bonveniga parolado de la 6a intern. Skolta Jamboreo, la ĉefkomisaro diris: Mi esperas ke vi uzos esperanton kiel eble plej vaste tiel ke ni ĉiuj havos la sperton paroli en alia lingvo ol nia gepatra. Kia belega afero estus se vi povus paroli kun ĉiu skolto kiun vi renkontas en tiu ĉi internacia lingvo. Notu ke tiu persono mem ne estis esperantisto, sed jes poste lernis ĝin.

Post alveno, pli ol 600 skoltoj kaj estroj sekvis la specialan kurson kaj 80 petis la specialan insignon kiu pruvas iun konon de Esp. La jamboreo ricevis 60 salutmesaĝojn kaj telegramojn en Esp. Unuafoje, Esp. estis la oficiala lingvo apud la Angla.

### Esperanto en la Sovjeta Akademio de Sciencoj.

La Hungaro, D-ro Istvan Szerdahelyi faris prelegon en nomita akademio pri la temo: "La objekto kaj limoj de interlingvistiko". Sekve de tiu konferenco starigis interlingvistika sekcio en tiu instituto de lingvistiko.

### La tioma plano por internacia lingvo.

La Rusa lingvosciencisto E. Svadost publikigis libron sub titolo. "Kiel aperos komuna lingvo". Tre detale li priskribas la forpasintajn provojn, la nunan situacion kiu pli kaj pli bezonas internacian lingvon, kaj ankaŭ esperanton. Ĝis nun, ĉio bona kaj tute en ordo. Sed; La aŭtoro venis al la konkludo ke esperanto ne estas sufiĉe perfekta; Ni povas akordiĝi ke en tio li pravas. Sed ne ke li forjetas esperanton pro tio. Kiu persono aŭ instanco venos iam kun la tute perfekta sistemo? Nun lia propono: ĉiu lando elektu lingvistojn kiuj devos elekti komitaton de lingvistoj kiuj devos siavice ellabori novan plej perfektan artefaritan lingvon. Ĉu, kara legant(in)o, vi jam vidas tion en la praktiko? Ĉu ne multe pli praktika nia jam ĉie funkcia Esperanto, kun la fundamento, kaj kun la ebleco de necesaj ŝanĝoj kondiĉe ke ĝi estos jam oficiale akceptita de la plimulto de la ŝtatoj kaj ke internacia akademio ellaboros tiujn ŝanĝojn?

### La internacia lingvo devos esti... la Nederlanda.

Kara Valona samidean(in)o, tio ne estas aserto de via Flandra redaktoro. Tio estas aserto de fama Franca lingvisto, prof. Etienne. Ankaŭ li kredas en la neceseco de internacia lingvo; sed li ne kredas en la ebleco de artefarita lingvo. Aliflanke li ankaŭ komprenas ke la grandaj potencoj neniam akceptos la lingvon de iu inter iliaj konkurencantoj (La Angloj ne volos la Francan; la Francoj ne volos la Anglan ktp.) Tial la internacia lingvo devos esti tiu de iu ne granda nacio kun tamen riĉa kulturo... la Dana aŭ la Nederlanda; prefere la Nederlanda" diris Etienne. Kiom ajn ni Flandrojn sentas nin honorigitaj, ni tamen ne subtenos pof. Etienne. Kaj pro praktikaj kialoj, kaj pro principoj ni plu laboras por Esperanto.



## 54-a Universala Kongreso de Esperanto

Helsinki, 26.VII - 2.VIII.1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando  
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

### OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝkotiĝoj - Ĝis la 31-a de decembro 1968 validas jenaj kotiĝoj:

1. Kongresano ne membro individua de UEA 970 Fr.
2. Kongresano membro individua de UEA kun Jarlibro (MJ) 835 Fr.
3. Kongresano membro individua de UEA kun Jarl. kaj "Esperanto"  
(MA) 700 Fr.
4. Edz(in)o de Kongresano en kat. 1. 420 Fr.
5. Edz(in)o de Kongresano en kat. 2. aŭ 3. 350 Fr.
6. Junulo ĝis 20-jara 300 Fr.
7. Universitata studento ĝis 30-jara 490 Fr.
8. Blindulo 390 Fr.

### Glumarko

Bela trikolora glumarko estas aĉetebla ĉe la Libro-Servo de UEA kaj ĉe la Landaj Asocioj. La prezo de dekmarka folio estas 0,50 ned. gld. (2steloj).

G.G. Pompilio

MET WELKEKENDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

# in't duifken

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS  
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

### NOVA SUKCESO DE ESPERANTO EN LA RADIOFONIO !

La Direkcio de la Pola Radio decidis pliampleksigi la ĝisnunan programon en la internacia lingvo de unu al tri duonhoraj disaŭdigoj ĉiutage.

Frumatene - je la 6.30 /per la meza ondo 200 m kaj mallongaj ondoj - 25,09 m, 31,45 m, 42,11 m 50,04 m/ laŭ la mezeŭropa tempo - estos elsendata la unua programo. La dua programo aŭdiĝos, kiel ĝis nun, je la 16.30 /per la mallongaj ondoj 25,34 m, kaj 31,50 m/, kaj fine la tria programo estos aŭdebla vespere je la 23.30 /per la meza ondo 200 m kaj per la mallongaj - 25,09 m, 31,45 m 42,11 m kaj 50,04 m/. Ni atentigas, ke la matena disaŭdigo estas plena ripeto de la vespera programo.

Tamen la estonteco de tiu ĉi eksperimento dependos de la aŭskultantoj mem, de ilia reago, de la nombro da leteroj kaj poŝtkartoj alvenontaj al la Pola Radio.

Do ni alvokas **diskonigi** ĝin kiel eble plej vaste, **instigi** al aŭskultado kaj skribado al la Pola Radio kaj jam nun **mendi** la senpage sendotan koloran programinformilon pri la novaj elsendoj. La estonteco de la nova pliampleksigita Esperanto-programo de la Pola Radio estas en la manoj de ĉiu, kiu nun legas ĉi tiujn vortojn. Ne hezitu do sed tuj diskonigu la eventon kaj mem skribu al :

Pola Radio  
Esperanto-Redakcio  
VARSOVIO Pollando

## U. E. A. 60-jara

En antaŭaj numeroj de ĉi-tiu jarkolekto ni emfazis la agadon de nia Universala Esperanto Asocio por ke vi konvinkigu ke ĉiu esperantisto devus fariĝi membro-abonanto de tiu nia internacia organizo. Ĝi ja meritas tion. Ĝi akiris prestiĝon pro la seriozeco de ĝia laboro. Ĝi vere gvidas nin. Se ni venas al estimindaj venkoj, estas dank'al U.E.A. Ni nun volas ankoraŭ atentigi vin je tri punktoj.

1) La "Kapitalo H. Hodler".

La aktiveco de UEA-kiu povus esti multe pli ampleksa - estas konstante bremsita pro monomanko. La estraro nun volas akiri bazan laborkapitalon de 500.000 guldenoj. Ĝi esperas atingi tion per obligacioj de mil guldenoj. La posedantoj de tiuj obligacioj ricevos malgrandan renton, 2%, t.e. rento pli malalta ol tiu kiun oni ordinare ricevas en banko. Oni cedas al UEA la diferencon inter tiu rento kaj la pli granda. Oni restas ankaŭ posedanto de la sumo per kiu oni aĉetis obligacion, sed tiu mono estas repostulebla minimume 10 jarojn poste, kun antaŭaverto de unu jaro. Se oni rezignas pri kiu ajn rento, la sumo estas repostulebla post ses jaroj. En kazo de morto, la obligacio iras al heredanto. UEA promesas ne fari borsajn spekulaciojn per tiu kapitalo. Ĉiujare estos kontrolo fare de renoma instituto. F-ino Vermaes administras la tuton. Pruntintoj ricevos detalan raporton. Krom personoj, ankaŭ grupoj kaj gruparoj povas kolekti la nomon por aĉeti akcio(j)n.

2) Prof. Lapenna estas kandidato por UN-premio.

UNO ek de 1968 aljuĝas premion por personoj kiuj havas specialajn meritojn sur la agadkampo de la homaj rajtoj. La komitato de UEA dum la kongreso de Madrid decidis kandidatigi sian prezidanton. Neniu inter ni dubas ke li meritas tion. Alia afero estas ĉu UNO pensos tiel. Se oni scias kiuj influoj agadas tie; kaj se oni scias ke ŝajne Esperanto havas malamikojn tie (memoru la peticion) tiam oni ne povas havi grandan esperon ke nia ŝatata prezidanto ricevos la premion. Sed eĉ en tiu kazo, UEA denove atentigas UNO-on kaj ĝiajn gvidantojn pri nia tutmonda aktiveco.

3) Semajno de internacia amikeco.

Unuafoje tia celebrado okazos en 1969, verŝajne en februaro. Ni konstatas ke ju pli iu virto aŭ rajto estas ne aplikata, despli oni emfazas ĝian necesecon. Tial la multegaj deklaroj pri homaj rajtoj ktp. Se oni vere kaj tute nature donus al ĉiu sian rajton tiam oni ne sentus la bezonon fanfaroni pri tio, aŭ propagandi por ĝi. Ĉiukaze, ni havos semajnon pri internacia amikeco kaj UEA partoprenos ĝin, por montri al la ekstera mondo ke nenie pli ol ĉe ni ekzistas tiu amikeco.



## BIBLIOGRAFO

Eliza Orzeszko : "Marta". Tradukita el la Pola lingvo de Dr. Zamenhof. Eldonita de "Editions Françaises d'Esperanto" sub givado de A. Ribot en Mandate, Francujo. Bindita. 213 P. Prezo : 15 Fr.

Ni komencas per iom grava riproĉo. Ne troviĝas biografia noto pri la verkistino. Tio tamen necesas. Oni devas enkadrigi la literaturajn ; klarigi la cirkonstancojn de ĝia ekesto ktp. por pli bone kompreni ĝin. Eĉ unu paĝo sufiĉus. Ne postulu ke la leganto konu ĉiujn aŭtorojn, aŭ serĉu unue informojn. E.O. naskiĝis en 1842 kaj mortis en 1910. Do ŝi apartenas al la realisma skolo, sed verkis laŭ, por tiu tempo, romantika stilo. Ŝi havis grandan influon pro sia humanisma tendenco.

Ĉi-tiu verko ne estas ŝia ĉefa. Oni povus pensi ke la verko ne plu indas esti legata, ĉar malnovtempa kaj do ankaŭ malnovmoda. En tio oni erarus.

Unue, preskaŭ ĉiuj periodoj kreis nombron da artverkoj tiaj kiaj restos eterne valoraj. Due, estas rimarkinda fenomeno ke la interesiĝo por la tiutempa literaturo rekreskis. Pruvo : la reeldono de multaj romantikaj verkoj. Ankaŭ tiu-ĉi eldono estas jam la 4a (laŭ la libro ; sed oni kontestas tion. Povas esti ke ĝi estas nur la 3a). Fina-rimarko : la libro estas bela, plaĉa eldono kaj... en Zamenhofa lingvo, do modela lingvo ; kaj ankaŭ facile legebla lingvo.

Charles Baudelaire : "La Spleno de Parizo". El la Franca tradukis Paul Lobut. Nr. 8 en la serio "Oriento-Okcidento". Eldonis Koko en København 1967. Bindita. 123 paĝoj. Prezo : 25 Dan. Kr. aŭ 12,50 Nederl. Guld.

Tiuj "poemoj en prozo" havis kaj daŭre havas grandan influon je la literaturistoj kaj literaturamantoj. La fina frazo el la unua prozpoemo, ekzemple, estas la titolo de unu romano de Françoise Sagan. Lobut prenis sur si malfacilegan taskon per la traduko de tiu verko. Por tute ĝui la verkon oni devas funde koni la francan lingvon kaj esti sperta en legado de franca literaturo. Tiam oni ne nur legas, sed ankaŭ sentas la tutan premon, la tutan nostalgion, la tutan drameton de tiuj franclingvaj prozpoemoj. Se ie vere, tiam tie-ĉi oni rajtas diri ke "traduttore" estas traduttore". Pro la longtempa kaj vastega uzateco la Francolingvaj vortoj kaj frazoj estas ŝarĝitaj je sentoj, ne nur je signifoj. Ja, tio estas neevitebla ; kaj la sama sorto atendas ĉiujn tradukojn. Laŭ maksimuma ebleco li faris bonan laboron. Tamen du rimarkoj. Kial tiom da neologismoj (kiel "despero.. anstataŭ malespero) kaj multaj aliaj ? La kredo de la neologismokreantoj ke nur per tute nova vorto ili povas esprimi sin adekvate estas ofte manko de esprimkapablo per la tamen sufiĉa ekzistanta vortprovizo. Oni eĉ demandas al si ĉu ili intence volas fortimigi la legantojn. Kontraŭe, li ege ŝparas sufiksojn. Eĉ en tiu mezuro ke li faras vortojn kiuj estas gramatike ne allaseblaj. Ekz : maljunino anstataŭ maljunulino ; bonino anst. bonulino. Oni renkontas

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 15240.

### Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de la venonta somera okazos **20-26. de julio** en **La internacia Altlernejo** de Helsingör. Venu por ĝui bean ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,  
Ingemannsvej 9,  
DK-8230 **Abyhoj**  
Danlando

NB. Speciala karavano el Helsingör al **UK en Helsinko** estos aranĝata. Ekiro 26/7 matene, alveno al Helsinko tagmeze.

multajn temojn de la "Floroj de l'malbono". Tiu-ĉi verko havas jes enkondukon pri la poeto ; kaj ankaŭ enkondukon de I. Lapenna pri la serio "Oriento-Okcidento".

Naskiĝo de Esperanto-Domo, kastelo Grésillon. 17 paĝoj. Illustrita. Formato de la "Kulturaj Kajeroj". Prezo : 3.50 Fr. aŭ 10 steloj.

Tiu broŝuro detale priskribas la estiĝon kaj la tre meritan laboron de S-ro H. Micard. (Tro mallonge) ĝi priskribas ankaŭ la kulturen vivon en la kastelo dum 14 jaroj. Ĝi citas multajn nomojn de prelegintoj : Sed ĝi devis ankaŭ doni iom da detaloj pri la pritraktitaj temoj ; por ke la legantoj havu ideon kiamaniere oni pliriĉigis la konon de la feriintoj. Ekzemple S-ino Cheverry en multaj prelegoj funde konatigis la tutan grafolandon Anjuo en ĉiuj ĝiaj facetoj. Se oni prilisentas tion, oni povus havi la ideon ke tiuj paroladoj estis... nu, ja, kiel oni ofte kutimas ĉe esperantistoj. Ni esperas ke multaj acetos la broŝuron... kaj sekve venos al nia granda, bela hejmo en Francujo.

"Norda Prismo" N-o 1 de 1968. 64 paĝoj. Illustrita.

Tiu numero, sub redaktado de W. Auld, tute similas al la antaŭaj. Feliĉe. El la enhavo ni citas jenajn interesajn : 1) "Mistaksita Duopo" de J. Francis = persona vido je Zamenhof kaj Baghy ; 2) poemoj de Auld, Eli Urbanova, Armand Su k.a. ; 3) artikolo de J.H. Rosbach pri Jus mortinta Norvega poeto A. Overland ; 4) rakonto de Julia Piro (nova Pola talento en Esperantujo ; 5) monologo de Emilja Lapenna ; 6) rakonto de Anna Brigadere el la Latva lingvo tradukita ; 7) dokumenta artikolo de N.Z. Maimon pri la familia vivo en la hejmo de Marko Zamenhof ; 8) moderna literaturo en Aŭstrujo ; 9) recenzoj. Mi ne aprobas nek alte taksas ĉion kion la kunlaborantoj prezentas (tio estas ekz. la kazo kun la recenzo de B. Ragnarsson pri "Memkritiko") sed tio estas ofte afero de persona, subjektiva ŝato. Entute ĝi estas bela kaj interesa numero. "Norda Prismo" estas nunmomente LA esperanta kultura revuo. Ĝi progresu, i.a. per multaj abonoj (prezo : 10 Ned. Guld. ; ĉe la administrejo : Eiler Frost, Ved Fortunen 16, DK 2800 Lyngby, Danujo).

"Tra Soveta Ukrainio" Ciklostilita. 41 paĝoj. Prezo ni indikita.

Adreso : Societo de Amikeco ; Esperanto-Komisiono.  
Kiev - 21 ; Str. Kirova 5a Sovjet-Unio.

Tiu bulteno kiu aperas en kvar lingvoj nun aperas ankaŭ en Esperanto. Iom pli ol la duono estas plenigita per poezio tradukita, ĉar la eldonantoj anoncas antologion de Ukraina literaturo en Esp. La aliaj artikoloj temas pri scienco kaj arto. Ĝi estas bona konatigilo de unu soveta respubliko. Espereble multaj esperantistoj klopodos akiri ĝin.

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit” vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko

Telefono 272875



## ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"  
Kunsidoj: Ĉiuvendrede en Brasserie  
"Capitole", Gemeentestraat 15  
Antwerpen je la 20.15a horo.  
Postreknumero: 726.54.

La 21an de junio S-ro E. Paesmans gvidis 20 verdstelanojn tra malnova kvartalo de Antverpeno dume rakontante pri historiaj eventoj kaj folkloraj legendoj kiuj rilatas al stratoj aŭ konstruaĵoj aŭ placoj. Oni konkludis la rondiradon en agrabla kafejo.

La 28an S-ro R. Van Humbeeck enkondukis kaj gvidis debatvesperon sub la temo "La Jaro de la Homaj Rajtoj".

El la tuta debato evidentiĝis ke estas relative facile kunmeti teorie, ekzemple, "deklaracion pri la homaj rajtoj", sed ke estas terure malfacile ĝin apliki praktike!

La 5an de julio - jam plena liber-tempa periodo - la "monata kroniko" donis la eblecon al la ĉeestantoj plenumi la programon per libervolaj kontribuoj.

La 12an S-ro R. Van Eynde plenigis la programon per raportado pri "Kongreso de la Naturamiko" en Kessel-lo kun komento kaj diapozitivaj havigitaj de F-ino A. Orsolini el Charleroi. S-ro J. Verstraeten relegis sian unuan Esperanto-raporton iam verkitan en 1950 - pri Brusela bankedo kie la iama prezidanto, D-ro P. Kempeneers, estis honorigata.

La 19an S-ro J. Verstraeten prelegis el libro de J. Baghy "Dancu Marionetoj" kaj vekis gajoran atmosferon pro la amuza kaj spritplena prozo.

La 26an estis anoncita: Libera tribuno; al kiu ĉiu ĉeestanto povis kontribui. Sed vizitis la grupon F-ino Marta Vari el Hungarujo, korespondantino de S-ro P. Peeraerts kaj S-ino Sprengers el Mehleno. La hungara samideanino plenigis la programon per rakontado pri la vivo en Hungarujo kaj raportado pri la Esperanta movado en sia urbo Miskolc. Krome ŝi bone konis Julion Baghy kaj aldonis multajn sciindaĵojn el lia vivo kaj laboro por Esperanto.

La 2an de aŭgusto S-ro F. Schellekens montris kelkcentojn da diapozitivaj pri siaj diversaj libertempoj en Grekujo, Francujo, Hispanujo kaj Germanujo.

## GRUPA VIVADO

La 9an denove "Libertempaj Raportoj" estis temo kiu permesis al F-ino C. Peeters aŭdigi tutan repertuaron de spritaj kiuj kreis amuzan/gajan atmosferon. S-ro P. Peeraerts ĝin danke uzis por raporti pri sia unua flugado en la aero per aviadilo: la gajeco inter la publiko ankoraŭ kreskis. Kiam S-ro J. Verstraeten prelegis ruzan kaj homorplenan ĉapitron el libro de R. Schwartz, "Prozo Ridetanta", la vespero konkludiĝis en vere gajega sfere.

La 23an S-ro M. Jaumotte raportis pri la 53a Un. Esp. Kongreso en Madrid kiu evoluis en bona atmosfero kaj agrabla sunplena vetero. Pluraj ĉeestantoj faris demandojn al kiu la raportanto detale respondis.

La 30an dum la "Monata Kroniko" S-ro F. Schellekens montris 180 belegajn kolor-diapozitivajn pri sia ĵus finiginta libertempo en Mittenwald/Germanujo.

La 6an de septembro S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn inter kiuj unu en Esperanto. Kontraŭe al la antaŭaj aranĝoj tiun ĉi fojon S-ro J. Haazen akceptis realigi la adapton de la filmo "Italujo en Koloroj" al la Esperanta lingvo. Li parolis la tekston, forigis la originalan muzikon kaj anstataŭis ĝin per tute nova. La rezulto estis bonega: la harmonio inter la parolata vorto kaj la muziko estis 100%. Cetere S-ro Jo Haazen flue parolis la tekston (libere tradukita el la franca de S-ro J. Verstraeten) laŭ tre facila maniero kaj sin konigis tiamaniere kiel bona estonta kunlaboranto al la teknika sekcio de la Verda Stelo.

La 13an - fakte kiel enkonduko de la vintra sezono - la Prez. S-ro M. Jaumotte, paroladis pri sia "Vojaĝo al Skotlando". Li bezonis pli ol 2 horojn por klarigi ĉiujn impresojn pri lando kiu, kontraŭe al la famo de la anekdotoj, tute ne estas avara sed gastama kaj homa kaj kie regas la samaj deziroj al paco, al prospero kaj al sendependeco kiel en ĉiuj aliaj landoj. Multaj personaj spertoj kaj anekdotoj miksigis kun la amaso da ilustraĵoj, lum-

bildoj kaj fotografaĵoj kiujn la Prez. kunportis el tiu tre norde situata lando. Lin trafis speciale la ne-ĉiam-amikaj rilatoj inter skotoj kaj angloj kiujn ili manifestis dum pluraj okazoj. Ankaŭ la manĝaĵo -kiun la Prez. precipe timis - estis bonega kaj ĝinda. La konkludo: bonega bela vojaĝo, ne sensacia, sed kiun S-ro Jaumotte rekomendas al ĉiuj samideanoj.

Sabaton, la 14an kaj dimanĉon, la 15an la junulara sekcio de la Verda Stelo organizis Esperanto-ekspozicion en la Jeugd-centrum SORM en Deurne, antaŭurbo de Antverpeno. Posttagmeze S-ro M. Jaumotte bonvenigis la ĉeestantaron sed precipe S-ron Mangelschots, skabenon kaj parlamentanon, kune kun kelkaj urbestaranoj. En sia repliko, i.a. S-ro Skabeno esprimis sian admiron por la laboro de la esperantistoj kaj promesis sian apogon personan al la movado kune kun tiu de la urbestarano. Rondirado en la ekspozicio kun klarigoj de la Prez. konkludis la viziton de la skabeno kiu aĉetis ankaŭ! Serio da diapozitivaj kun komento informis la ĉeestantojn pri Esperanto kaj ĝia movado. Impona libro-stando montris la amplekson de la Esp. literaturo. Broŝuroj estis disdonataj al multnombra publiko kiu plej grandparte konsistis el ĝeĵunuloj. Bonega rezulto: ekestis el tiu ekspozicio elementa kurso por ĝeĵunuloj. Jam 10 ĝelernontoj enskribiĝis. S-ro P. Peeraerts akceptis ĝian gvidadon!

London, la 16an nova elementa Esperantokurso, gvidata de S-ro H. de Roover kaj perfekta kurso, gvidata de S-ro R. Van Humbeeck, komenciĝis en lernejo de Belgiĝi. Por la 1a kurso enskribiĝis 11 personoj, por la alia 10! La Prez. Jaumotte faris la enkondukan paroladon kun multe da sukceso. Estis entuziasma publiko.

La 20an S-ro J. Montmirail faris paroladon pri "La sekretoj de la Flugarto". Ĉar li scipovas konduki aviadilon, li plej bone povas klarigi ĉiujn sciindaĵojn pri la aviado. Li tion faris laŭ tre klara maniero, uzante nigran tabulon kaj diversajn mapojn de Belgio dum la magnetofono havigis al li eblecon zorgi por deca sondekoro.

La 27an S-ro J. Lernout referis la paroladon kiun li jam prezentis en la brusela grupo pri "Unuaj Kulturproboj en ĉi tiuj benataj Regionoj". Altnivela kaj kulturplena prelego kiun la paroladisto ilustris per kelkcentoj da

diversspecaj kaj belkoloraj diapozitivaj. Li priskribis la historiajn vagojn de la diversaj popoloj kaj gentoj kiuj profunde influis la evoluon de Eŭropo por restadi, finfine, en niaj regionoj kie la paroladisto trovis aŭ malkovris -precipe en la arkitekturo - la plurajn elementojn kaj postsignojn kiuj atestas pri tiu pasinteco. La paroladisto anoncis la daŭrigon de sia parolado sub la titolo "La Spirito de la renesanco" dum unu el la postaj monatoj.

La 4an de oktobro S-ro H. Cautraert paroladis pri sia vojaĝo al "Tunizio" kaj montris belajn memverkitajn kolor-diapozitivajn, kiuj alportis al la vidantaro la veran impreson kvazaŭ ĝi mem kunfaris la vojaĝon tra Tunizio, ĉe la paradizaspekta marbordo, tra la impona dezerto kun ĝia speciala enloĝantaro, la vivo en la oazo, la butikuma kvartalo "souchs", la ruinoj el la glora pasinteco de Tunizio. Ĉio tio evoluis antaŭ la okuloj de la imponigitaj ĉeestantoj kaj vekis en ili la fortan deziron foje mem iri tien kaj persone sperti ĉion kion ili sekvis sur la ekranon. La Prez., S-ro M. Jaumotte, kiu jam vizitis Tunizion antaŭ kelkaj jaroj, aldonis propajn impresojn pri tiu progresema lando.

## FAMILIA VIVO :

**Honorigo:** Kun vera fiero ni sciigas ia honorigon de S-ro Jo Haazen pro lia 3a sinsekva venko en la sonorilarista konkurso de Hilversum en Nederlando. Pro tio li definitive akiras la pokalon kiun la urbestarano de Hilversum ĉiujare transdonas al la laureato. Korajn gratulojn al nia amiko!

Samtempe ni denove surpriziĝis per la novaĵo ke S-ro Jo Haazen estas oficiale dungita en la urba servo kiel urba sonorilaristo. Laŭ sia propra esprimo: li nun havas la plej altan poston en la urbo! Efektive li nun regule estras la klavaron supren en la katedralo de Antverpeno!

Ni, refoje, gratulas nian amikon kune kun la ĉarma edzinetino. Imelda, kaj esperas ke la estonteco estu nun por ili pli trankviliga!

**Naskiĝo:** En la familio Ch. Van Gompel-De Staercke naskiĝis 3a infaneto: Martin! La patrino kaj la novnaskiĝinto fartas bone. Al niaj fidelaj gemembroj - kiuj estis festitaj pasintajn jaron



jam pro, respektive, siaj 15 jara kaj 10-jara fidela membreco - ni sendas niajn varmajn gratulojn kaj bondezirojn por la estonteco de la nova intano.

#### Funebroj

Ni eksciis pri la morto, la 25an de oktobro, en kliniko de Hoboken, kaj en la aĝo de 79 jaroj, de S-ro P. Verstraeten, membro de "La Verda Stelo" kaj patro de la ĝenerala sekretario de BEF kaj sekretario de la antverpena grupo : S-ro Jules Verstraeten.

Ni prezentas al li, kaj ankaŭ al la patrino S-ino Verstraeten, al la filino kaj bofrato G-roj Fr. Govaerts, ĉiuj membroj de "La Verda Stelo", - niajn sincerajn kondolencojn okaze de tiu kruela bato de la sorto.

Terura bato trafis nian fidelan membron, S-ron F. Jacobin, pro la morto de liaj karaj gepatroj. En 2 sinsekvaj tagoj ili forlasis lin por eterne.

Al nia bona amiko S-ro Jacobin kaj familio ni esprimas niajn plej profundajn sentojn de kondolenco.

#### Promocio

La Ministro pri Nacia Defendo informis la rezerv-kapitanon S-ron Roger Jaumotte, denaska ĝia membro de "La Verda Stelo", pri lia promocio je la grado de Komandanto.

Ni prezentas al li kaj ankaŭ al ĉiuj liaj familianoj membroj de "La Verda Stelo", niajn plej sincerajn gratulojn.

#### BRUGA GRUPO ESPERANTISTA REGA SOCIETO,

Kunvenoj : provizore nur ĉiudusemajne la mardon, je la 20a en "Strijdershuis,, Hallestraat. (apud la granda Placo "Markt...)

Nova adreso de la prezidanto :  
Ch. Poupeye  
Filips de Goedelaan 17 bis Brugge  
Tel. (050)18358.

#### REGA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

Kunsidoj ĉiulunde, je la 20a h., en nia nova kunvenejo :

- Hotelo "EXELSIOR", elektu inter jenaj tri enirejoj :
- 1e "Hôtel des Colonies",  
6, rue des Croisades",
  - 2e "Hôtel Exelsior",  
7, rue du Progrès,
  - 3e "Les Mousquetaires",  
11, rue du Progrès.

#### DECEMBRO 1968

02an :

Parolata jurnalo (serioj A + B), kaj transdono de la premioj 1968.

09an :

S-ro Ivo DURWAEL, venis el Mehleno por klarigi al ni pri la "EVOLUO DE LA EUROPA IDEO" : post paŭzo okazis debato koncerne la eŭropan movadon.

16an :

lastan lundon de la jaro, tradicie prizorgota de nia eminenta literaturisto Albert Samijn dediĉota al "Zamenhofa Vespero".

Notu bone : Pro la 60-jara Jubileo de nia Grupo, festita ĉi-jare, ne okazos nia kutima Jara Festeno en 1968.

#### KARLOREGA GRUPO ESPERANTISTA

En Majo ni komencis la eldonon de Monata Informilo en franca lingvo kiun ni dissendas en 400 ekzempleroj kiel propogandilon. Ni ankaŭ iniciatis monatan vesperon dediĉitan al projekciado de 16mm-filmoj parolantaj, en la salono 4 de nia Urbodomo, dank' al nia sekretario S-ro Destabelle.

En nia sidejo "CAROLO" ni regule kunvenos ĉiujn jaŭdojn : instruado al lernantoj, legado de novaĵoj, debatoj, komuna laboro okupos niajn 3 horojn semajnajn.

La Nacian Kongreson de Bruselo partoprenis 4 personoj de Charleroi, kontraŭ unu la antaŭajn jarojn. Do oni povis multe debati dum la kunveno de la 6a de junio, pri la okazintaj kaj decidoj de tiu N.K. Dimanĉon la 9an, 3 veturiloj forlasis Karloregon por renkonti en Ronquières niajn Antverpenajn samideanojn.

La rendevuo estis : inter la 10a k. la 11a h. sub la turo ! Kiam ni atingis la 11 h. 30 sen vidi iun Antverpenan aŭtoĉaran, ni diskutis pri kion ni farus. Je la 12 h ni tagmanĝis en la "snack-bar" de la turo kaj poste komencis la viziton.

Dank'al la afableco de S-ro Fauville, ACEC-ingeniero, ni havas unikan okazon viziti la grandan ĉambron de kontrolo de ĉiuj aparatoj. Tie ni povis sekvi sur ekranoj, kaj samtempe vidi en la naturon, la alvenon de la kuvego entenante ŝipon, la malfermon de la pordegoj kaj la eliradon de la ŝipo en la kanalon mem. Ni kredas ke estis kvazaŭ la sola ŝipo kiu uzis la instalajojn dum tiu tago.

Ni vizitis poste, en Nivelles, la bazilikon kaj la arkeologon muzeon kaj ĉiujn stratojn kie antverpena aŭtoĉaro povus halti. Je la 5 h, ni daŭrigis ĝis la Kastelo de Huizingen kie ni promenadis tra belaj ĝardenoj sen renkonti iun Antverpenanon. Kiam ni rehejmis, ni vespermanĝis la famajn "tartes al djotte", trinkante vinon je la sano de ĉiuj samideanoj, eĉ de tiuj kiujn ni ne renkontis...

Tiu sezono finiĝis per disdono de diplomoj la 27a de Junio kaj la kutimaj adiaŭoj antaŭ la libertempado de ĉiuj membroj.

#### ESPERANTO-GRUPO WILSELE

Wakkerseele stwg. 182 Wilsele

Sabato la 14.9.1968 okazis festkunveno dum kiu la anoj kiuj partoprenis al la kongreso de Madrid klopodis rekrei la etoson de la gaja kaj intersplena universala kongreso : pere de rakontado kaj la diapozitivaj de F-ino Henquinez kaj S-ro De Vleeschauer ili bonege sukcesis en tio.

#### GRUPA VIVADO VERVIERS

##### PROGRAMO DE LA KUNVENOJ ĜIS LA FINO DE 1968.

DIMANĈON	29-9.	"Trilanda Renkontiĝo" en Düren, Germanujo.
LUNDON	7-10.	Amuziĝante tra la severa fiziko. Preleganto Sinjoro Profesoro Georges VANBREUSE.
MERKREDON	9-10.	Malfermo de Esperanto-kurso, en Athénée, je la 18h. Instruisto : Sinjoro Robert NOEL.
MERKREDON	16-10.	Inaŭgura leciono ĉe Supera Pedagogia Lernejo, rue du Laveu, 52, okaze de malfermo de Esperanto-kurso por profesoroj (je 14h). Preleganto : Sinjoro Doktoro Pol DENOEL, temo : "Interlinguistique et Structuralisme".
LUNDON	21-10.	Mia vojaĝo en Svisujo. Preleganto : Sinjoro Serge DENIS ; koloraj lumbildoj.
LUNDON	18-11.	Mia vojaĝo en Londono. Preleganto : Sinjoro Joseph RENARD. Koloraj lumbildoj.
LUNDON	2-12.	Evoluo de la vivantaj estajoj. Preleganto : Sinjoro Profesoro José JACOB.
LUNDON	16-12.	Komitata kunveno.

#### IN MEMORIAM P. H. MOOY

La morto de Sinjoro P.H. MOOIJ, profesoro de matematiko, okazinta la 27-an junio 1968, afliktis nin ĉiujn.

Dum multaj jaroj, Sinjoro MOOIJ estis membro de L.E.E.N. (La Estonto Estas Nia) al kiu li donis sian valoran kunhelpon, sian scion kaj elstarajn kvalitojn. Li plenumis la funkcio de ĉef-delegito en Den Haag.

Por personaj kaŭzoj li venis al Bruselo en 1939 kaj fariĝis membro de la Flandra Ligo kaj de la Reĝa Belga Ligo, sed restis ĉiam fidela membro de sia landa asocio L.E.E.N. La mortinto partoprenis multajn universalajn kaj fiandrajn kongresojn. En diversaj Esperanto-gazetoj li prizorgis la rubrikon de krucvorteningoj. Li ankaŭ helpis S-anon Rogister kompili la Esperantan proverbaron de D-ro Zamenhof, kiun reeldonis "Stafeto". Kiel libroamanto, li konstituis bibliotekon en kiu troviĝas valoraj verkoj kaj kiun li destinis laŭ testamento al L.E.E.N. Nia nederlanda samideano forlasis nin 85-jara.

Omaĝon je la memoro de tiu sindona, profunde honesta samideano pri kiu ni konservas karan kaj dankan penson.

Sino Elfriede ERNST



# manufakturaĵo <sup>ĉ</sup>firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056)216.54



## **VIRINAJ BLUZOJ** **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmanko

por la eleganta sinjorino

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej

altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj  
konfekcibutikoj

### **PRECIPAJ CENTROJ :**

Antwerpen	:	Aalmoezenierstr. 2 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87 Leysstraat 10
Arlon	:	12 Marché-aux-Légumes
Brugge	:	Breidelstr. 8
Brussel	:	Anspachlaan 194 Oude Kleeerkoperstr. 31
Gent	:	Brabantdam 21
Herstal	:	4 Rue Large Voie
Leuven	:	Bondgenotenlaan 13
La Louvière	:	16 rue Albert 1er
Luxembourg	:	67 Place de la Gare
Mechelen	:	IJzeren Leen 32
Oostende	:	Kapelstraat 23
Roeselare	:	Ooststr. 124
Tournai	:	75 Rue Royale
Turnhout	:	Herentalsstr. 6
Verviers	:	2 Pont St. Laurent
Wetteren	:	Jos Buyssestr. 39-a